

Tagordo:

1. Protokolo de la lasta asembleo
2. Raporto de la prezidanto
3. Raporto de la kasisto
4. Raporto de la kaskontrolantoj
5. Mortintoj, demisiantoj kaj novaj membroj
6. Kotizoj
7. Retejo
8. Informilo
9. Elekto de la komitato
10. Elekto de la kaskontrolantoj
11. Programo 2012 - 2013
12. Proponoj kaj diversaĵoj

... okazas je la 19-a ĉe unu aŭ la alia el la esperantistoj, kiuj deziras plibonigi sian lingvon parole. Ĉiuj konsentas korekti unu la alian. Poste, ni kune manĝas la «kanadan» piknikon alportitan de ĉiu.

La venontaj renkontoj okazos ...
vendrede, la 10-an de februaro

...ĉe Karlota en Vevey
021 922 34 73

Vendrede, la 24-an de februaro
...ĉe Françoise en La Tour-de-Peilz
021 652 08 45 - 079 517 44 43



Tre grava dato

SES invitas vin ...
merkrede la 4-an de aprilo
je la 17-a en Vevey
Le Magasin du Monde
por inaŭguri ekspozicion.
Venu multnombraj!

Laŭzana Esperanto-Societo

Informilo

Februaro 2012 - no 02

La komitato kunvokas la membraron al la ...

Ĝenerala asembleo

de la Laŭzana Esperanto Societo (LES)

lunde la 6-an de februaro 2012, je la 20-a
ĉe la unua etaĝo de la stacidoma bufedo

Lunde la 5-an de marto

Decidota

Lunde la 2-an de aprilo

Preparado pri la ekspozicio en Vevey (Magasin du Monde) sub la respondeco de Sonia kaj de Karlota

Lunde la 7-an de majo

Decidota

Sabate la 16-an de junio

Ekskurso

Lunde la 3-an de septembro

Decidota

Lunde la 1-an de oktobro

Decidota

Laŭzana Esperanto - Societo

Société Lausannoise d'Espéranto

Poŝtfako - Case postale 246 * CH - 1000 LAUSANNE 22

+41 (0)76 411 14 55 * +41 (0)21 647 29 28

esperanto@citycable.ch * www.esperanto.ch/Lausanne

Poŝtĉekkonto - CCP 10-26785-8

Prez.: David Bühlmann * 021 624 36 38 - Vicprez. Charlotte Blanc Maillard* 079 393 32 63

Sekr.: Francisko Randin * 076 411 14 55 - Kasisto.: Sonia Daubercies * 079 649 88 86

Protokolo 2011

La ĝenerala asembleo de LES

okazis la 7-an de februaro 2011

ĉe la unuaetaga salono de la bufedo CFF en Laŭzano.

Ĉeestis 12 aktivaj membroj :

David Bühlmann (prezidanto) - Charlotte Blanc Maillard (vicprezidanto) - Sonia Daubercies (kasisto) - François Randin (sekretario) - Rosario Scopelliti - Christiane Andreae - Françoise Pétermann - Lucienne Dovat - Gilbert Darbellay - Giulio Grigoletto - Monique Golaz - Cléa Robin.

Ĉeestis 1 vizitanto : Viktor (amiko de Charlotte)

Senkulpiĝis 4 aktivaj membroj kaj 4 kandidatoj :

Malte Giovanoli - Yvette Goy - Stéphanie Strappazzon - Bernard Junod - Pierre Delaunay

La prezidanto malfermas la asembleon je la 20-a kaj 15.

Tagordo de la asembleo 2011

La tagordo estas akceptita unuanime.

Protokolo de la lasta asembleo

La protokolo de la lasta asembleo estas akceptita unuanime.

Raporto de la prezidanto

David B. raportas pri la diversaj eventoj en 2010 - 2011. La prezidanto rememorigas al ni pri la diversaj kunvenoj, kiuj kunigis multajn partoprenantojn, speciale dum la ekskurso kaj la prezentado de esperanto en la bazar. La plej grava momento ĉijare estas la seminario semajnfina de André Cherpillod, kiu komencis jam la vendreda vespero ĝis la tradicia kunsido lunda.

Raporto de la kasisto

La kasisto raportas pri la diversaj kasaj movoj. Ŝi anoncas ke la sekvantaj membroj aktivaj ne pagis la kotizojn dum du jaroj kaj tiel estas konsiderataj kiel subtenantoj: Richard Ducret, Yvette Goy, Marie Hofstetter, Tina Lanz, Jeanne Mamin, Markus Sanz, Pietro Rotolo, Dominique Schöni.

Raporto de la kaskontrolantoj

La raporto de la kaskontrolantoj estas legita de Christiane Andreae.

Voĉdono pri la raporto

La raporto de la prezidanto, de la kasisto kaj de la kaskontrolantoj estas kune akceptitaj unuanime.

Demisiantoj kaj novaj membroj

Jaqueline Vasserot kaj Nicole Margot sendis leteron por anonci sian demision. Estas neniu nova membro.

Kotizoj

La kotizoj restos po sFr 50.- por la aktivaj kaj po sFr 30.- por la pasivaj membroj kaj po sFr 10.- por la junuloj.

Retejo

Ni metas la reton en paŭzo: www.alawa.ch/les.

Informilo

Françoise Pétermann konsentas okupiĝi pri la redakcio de la informilo. Ŝi sendos la komputilan tekston al Francisko Randin kiu sendos ĝin perpoŝte aŭ perrete al la membraro.

Memore: Ĉiuj membroj - aktivaj, pasivaj, junaj kaj honoraj - ricevas **perpoŝte** la februaran informilon (kunvokon al la ĈK - protokolon lastasemblean - aliĝilon venontjara pri la informilo - kotizpagon).

Mistera kastelo: Ni revenas al la plua verkado de tiu rakonto. Deziras ricevi ĝin: Cléa - papere, Victor - papere, David - papere, Monique - papere.

Elekto de la komitato

La komitato estas elektita unuanime:

Prezidanto : David Bühlmann

Vice-prezidanto : Charlotte Blanc Maillard

Kasisto: Sonia Daubercies

Sekretario: Francisko Randin

Elekto de la kaskontrolantoj

Rosario Scopelliti prezidos en 2011. Françoise Pétermann estas elektita kiel nova membro.

Dataro 2011 - 2012

La lundaj kunsidoj: la 7-an de marto - la 4-an de aprilo - la 2-an de majo - la 5-an de septembro - la 3-an de oktobro - la 7-an de novembro - la 9-an de januaro
La ekskurso okazos sabate la 18-an de junio, la Zamenofa Festo ... sabate la 17-an de decembro kaj la ĝenerala asembleo ... la 6-an de februaro.

La budo de la bazar en Laŭzano: Sabate la 16-an de aprilo, la 4-an de junio, la 16-an de julio, la 24-an de septembro, la 22-an de oktobro.

La budo de la bazar en Belmont: Sabate la 21-an de majo.

Proponoj kaj diversaĵoj

Charlotte anoncas:

La 26-an de marto okazos la asembleo de SES en Lugano.

La 27-an de aŭgusto Claude Gacond estos festata en la Chaux-de-Fonds por sia 80-a naskiĝdatreveno.

La prezidanto fermas la asembleon je la 22-a.

La sekretario : Francisko Randin

